La Esperanto-Gironde Informilo

NOVEMBRO 2026

N° 185

Aŭtuna renkonto



Protokolo de la kunveno de Esperanto-Gironde
okazinta la dimanĉon 28an de junio 2026 en Pesako

Partoprenintoj: Katya, Joël, Sean, Elvezio, Jean-Seb, Annie, Klodin', Olivier, Eric, Marcelo, Janine, Yannick.
Senkulpigitaj: Hervé, Luca, Gloria, Bernardo kaj Rose.

Elvezio memorigas, ke la **Forumo de la asocio** okazos en Pesako sabaton la 05an de septembro. Por animi la budon krom Elvezio volontulas Seán, Jean-Seb, Eric kaj Olivier.

Por la jarfina **Zamenhof-tago** Elvezio konfirmas, ke JoMo koncertos la 13an de decembro en Eo kaj okcitana lingvo. Ĉar neniu urba salono estis tiam disponebla, Elvezio rezervis la spektaklejon «salle de France», kie en decembro 2024 okazis la koncerto de Christian Leduc. La kondiĉoj estas la samaj kiel tiam (250€).
Restas farende: Afiŝoj + reklamado

LEGI n°184 ĵus aperis. Pro la kanikulo la poŝtoficejo estis fermita dum la tuta semajno... do la paperaj informiloj sendotaj.
La ĉeestantoj gratulas Katjan pro ŝia leginda rima, poeta raporto pri la maja Eŭska renkontiĝo en Donapaleo (Saint-Palais).



Eblas legi artikolon el la revuo «**Senior reporter**» el la bordoza urbodomo post rebata reago de Dominiko al la vorto «monda dialekto» de Corine, la ĵurnalistino. Kvankam ĝi entenas kelkajn negravajn erarojn, la artikolo estas bona aliro por interesatoj.
Joël memoras pri la parolado de Charles Pasqua, iama policoministro: «Ne gravas kion oni diras pri mi, gravas ke oni parolu pri mi.»
https://seniorsreporters.bordeaux.fr/2026/06/17/lespoir-cest-lesperanto/

Pri la EKE okazonta inter la 14a kaj 17a de majo 2027 en Carrey-le-Rouet apud Marsejlo. Samjare la UK okazos en Aŭstralio.

Vojaĝo tra Irlando: Jean-Seb kaj Annie entuziasmege raportas pri sia bela, tre interesa grupvojaĝo en Irlando. Ili tie ne suferis pro la troa varmo (konstateblas sur la foto). Ili vizitis multajn lokojn: i.a. Dublin, konstruejon de l' Titanic en Belfast, Derry, la plej nordan parton de Irlando, la bazaltan ŝoseon de la gigantoj (angle *Giant's Causeway* - foto de Annie), marbordon kun ŝtonegoj prismoj, Galway en Okcidento, Connemarra, Dingel, Kerry kaj fine Kork.
La programo estis densa, rapida (10 tagoj), multo estas vidinda.





Mirinda ankaŭ estis spektaklo de irlandaj dancoj rapidpaŝaj kun rigidaj supraj korpopartoj, laŭ tradiciaj muzikoj.
Seán tre ŝatas la okcidentan parton de la lando pli irlandan. Li precizigas ke du E-kluboj tie aktivadas: po unu en Dublino kaj Belfasto. Tamen bedaŭrinde ne tro multnombraj.
La ĉiĉerono parolis pri irlanda proverbo: *Kiam vetero belas, estas pluvonta. Kiam ĝi malbelas, estas pluvanta.*
Tamen nur dum du horoj vere falis gutoj kaj la cetera vetero estis suna.



Luca kreis belan afiŝon - vidu ĉi-apude - por anonci koncerton de la rokbando, en kiu li mem muzikas! Ĉiuj estas bonvenaj por aplaŭdi lin kaj liajn kunulojn.

Seán sendis longan kaj pozitivan artikolon pri Esperanto en la angla de Katie Thornton, usona ĵurnalistino. Ĝi titoliĝas «Love Language» (Lingvo de Amo). La «Harper's Magazine», kie ĝi aperis, havas pli ol 100.000 abonantojn en la tuta Usono. Jen 100.000 legontoj de la longa, 8.000 vorta artikolo. Ŝi partoprenis en Brno kvankam ne parolas Esperanton.

Seán informas pri sia partopreno en la Seminario de irlandlingvaj juĝistoj kaj juristoj en la Irlanda Kultura Centro en Parizo. Li estis tie invitita por prelegi pri sia libro de *Routledge* publikigita junie 2025. La organizintoj volas nun publikigi la kontribuojn de la prelegintoj. *Cartlann Chumann Barra na Gaeilge*, la tuto estas en la irlanda lingvo, kompreneble. Tamen tiam Sean sukcesis paroli pri Esperanto. Ja la vorto Esperanto aperas 16-foje en la tekto.

Le Haillan, la tiea urbestro kaj Esperanto

Bernardo sendis la negativan respondon de la urbestro de Le Haillan pri eventuala partopreno de la urbo en la festoj pro la 140jariĝo de Esperanto. (vidu la retmesaĝon tuj poste).

> *De : <malige.philippe@orange.fr>*
> *Date: jeu. 25 juin 2026 à 16:19*
> *Subject: ESPERANTO*
> *To: <bernard.sarlandie2@gmail.com>*
> *Bonjour Bernard,*
> *Suite à tes demandes, je t'informe que la Ville du Haillan n'envisage pas de s'associer à la manifestation relative au 140ème anniversaire de la naissance de la langue esperanto.*

Je me permets cependant, à titre personnel, de te poser une question. Comme tu le sais, je suis philatéliste. Est-ce que votre organisation a prévu l'émission d'un timbre-poste pour cet évènement. Si ce n'est pas le cas et si cela vous intéresse, je peux vous guider pour cela. Au besoin, on peut prévoir de se rencontrer pour en parler...
Bien cordialement et bien amicalement
Philippe Malige - Maire du Haillan

Komento de **Bernardo**: Ĉu maldekstre, ĉu dekstre, sama senintereso pri nia lingvo.

Ĉu E-poŝtmarko? Tamen la filatelista demando pri eventuala poŝtmarko pri la 140a jubileo de Eo tiklis nian atenton. Kaj tiu ideo naskis diskuton inter ni kaj levis intereson de pluraj ĉeestantoj.
Elvezio reparolas pri la pariza universitata kongreso de lingvistikistoj: Eo 140 ans, ce n'est plus un projet. Kaj demandas sin ĉu Esperanto-France ne pretus transpreni la ideon.
Janine komentas, ke eblas mem eldoni; tamen hodiaŭ oni ne plu uzas multe, ĉar kvazaŭ malaperis leteroj kaj bildkartoj el niaj kutimoj.
Ĉu EG eldonos poŝtmarkon por 140a jubileo? Kiom? kaj kiom kostos?
Seán proponos la ideon al la UEA-komitato kaj raportos pri la diskuto.



Kontaktoj kun **Christian Barnadat, pranepo de Charles Brunet**.
Marcelo raportas pri siaj kontaktoj kun Christian Barnadat, jen per letero, jen per retmesaĝoj, jen per telefonado. Pranepo de Charles Brunet li surprize sed tre entuziasme respondis al la alvoko, des pli ke li delonge interesiĝas pri la historio de sia familio kaj aparte pri sia fama praavo. Li kolektis multajn arkivojn kaj pretas prezenti tiujn, kiuj rilatas al la Esperanto-movado, okaze de aŭtuna kunveno de Esperanto-Gironde. Tuj la kontakto estis simpatia, la telefonado daŭris preskaŭ unu horon kaj la interŝanĝoj de dokumentoj pliriĉigis la kolektojn de Christian Barnadat kaj de Marcelo.

La grupanoj tuj aprobis tiun inviton por kultura posttagmezo. Ĉiuj ŝajnis tre interesitaj pri tiuj novaj informoj koncerne fervoran Esperantiston, kiu kunfondis la unuan *Groupe de Bordeaux*, oficiale en 1902, des pli ke li ĉefrolas en unu el la eseoj verkataj por la bulgara konkurso. (vidu sube la posttagmezan taskon).



Spiritisma donaco: Eric ricevis kiel donacojn, stokon da libroj kaj revuoj. Belaspektaj, ili estis presitaj en Brazilo kaj estis transdonitaj de iu el Lot-Garonio pere de Dominiko al Eric. Ĉiuj temas pri spirtismo, ofta en Brazilo. Amuze, Eric devige trudas al ĉiu, ĉar ja neniu vere interesiĝas pri tio. Eĉ male, pro nia kartezia kulturo kaj pensmaniero.

Eric kaj Olivier informas pri la instruoj de Eo per **retkursoj** de Dominiko. En Ste-Hélène pluraj homoj komence scivolemis sed ne revenis. Nur malmultaj el La grajneto daŭrigas. Tamen ekzistas kaj gravas. Ni persistu.

La datoj de la venontaj grupkunvenoj:
sabaton 05an de septembro: forumo de la asocioj en Pesako
dimanĉon **20an de septembro**
dimanĉon **25an de oktobro**
dimanĉon **29an de novembro**
dimanĉon **13an de decembro**: Zamfesto kun koncerto de Jomo en la salono de la kvartalo France, strato Anatole France en Pesako.
Jam notu tiujn datojn sur vian kalendaron. Elvezio rapide kontaktos la urbodomon por konfirmi pri la loko(j), prefere la kutima Centra salono (Salle du Bourg).

Elvezio konkludas la kunvenon per surprizo: **kvin verdajn ĉapojn** li elsakigas! Taŭgaj por la deĵorantoj ĉe informbudo... kaj li transdonas la fakturon al la kasisto!

Bonan apetiton!

Kiel ofte, Marcelo animas la posttagmezon per projekciado:

1/ **La tri eseoj komune finredaktitaj**

En januaro ni fiksis planon por finredakti en junio tri eseojn: kaj ni sukcesis teni tiun veton! Tiu lasta etapo konsistis en komuna relegado kaj plibonigo de la tri tekstoj. Gratulojn al ĉiuj kunverkintoj. Luca partoprenu la konkurson sianome sendonte la eseon pri la sukceso de Ivo Lapenna ĉe Unesko en Montediveo en 1954. Katja sendu tiun pri la unua parola praktiko de la lingvo kaj Jean-Seb tiun pri la grava rolo de humuro en Esperanto dank' al memoraĵo de Charles Brunet kaj Prof. Bergonié.

Marcelo preparos specialan numeron de LEGI kompilonte tiujn verkojn... post ricevo de la oficialaj ~~premioj~~ rezultoj de la konkurso.

2/ **La sekreta vorto**

Sekvas malkovro de la perreta ludo esperantigita de nia perigorda amiko, Claude Labetaa. Tiu ludo tuj kaptis la intereson de ĉiuj ĉeestantoj, kiuj bonvoleme komune ludis laŭ diversaj longecoj de la vortoj. Notindas brila sukceso de Kajta. La retaliron sekve petis pluraj ludemuloj. Jen ĝi denove:

http://esperanto-gep.asso.fr/ludoj/sekretavorto/

3/ **Distraĵo antaŭ someraj libertempoj**

La lastan duonhoron estis dediĉita la legado de asertoj pri la franca lingvo «de Molière», kaj ĉiuj estis petataj reagi.

https://fr.babbel.com/fr/magazine/la-langue-de-moliere-insolite-infographie#:~:text=La langue de Molière en,, et gramme : lettre).

4/ Fine ni kunkantis **la Eŭropan himnon**... kutima kulmino!

Raportis Klodin'

ESPERANTO-GIRONDE
KUNVENO en salono Verthamon en PESSAC
la 20an de septembro 2026
de la 10a 30 ĝis la 16a

Ĉeestis: Jean-Seb kaj Annie Brilleaud, Elvezio Canonica, Janine kaj Yannick Dumoulin, Gloria Gargallo, Hervé Giranton, Katya Gradzion, Joël Lajus, Olivier Moreno, Seán Ó Riain, Klodin' Pomirol, Marcelo Redoulez, Jean-François Seyler, Eric Tiffon
Bernardo venis antaŭkomence por simpla amika saluto kaj interŝanĝo de rapidaj novaĵoj... kaj akiris la libron *La valizeto 518*). Fine de la mateno alveniis Luca. Posttagmeze alvenis Jean-Seb.

Ĉiuj ĝojis retrovi sin post la pasintaj kanikulaj monatoj.

Post bonveniga saluto Elvezio memorigas la datojn por la venontaj kunvenoj kaj proponas tuj fiksi datojn por la unua semestro 2026 por rezervi la kunvenejon de la urbodomo.
Jarfine 2026: dim. 25/10; dim 29/11 kun temo *La valizeto 518*; dim 13/12 **Zazatago** kun koncerto **Jomo** akcepto je la 14h30 - koncerto je la 15h kun libera prezo (samkiel por Christian Leduc).
Jarkomence 2027: sab 16an jan 2026 por akcepti **Brunet** (konfirmote); dim 21/02; dim 21/03 **Printempo de l' poetoj**; dim 18/04 **Ĝenerala Asembleo**; sab 22/05.



La someraj eventoj

La forumo de la asocioj en Pesako (05/09)**- Elvezio** legas la raporteton ĉi-poste aldonitan.
Seán starigis budon je sama forumo en **Biscarosse** kaj proponis kurson en la mediateko.

Gloria raportas pri la **SAT-kongreso en Leono** (19-25/07). Ŝi kunportis la kongreslibron. Tien venis 80 gekamaradoj el 13 landoj. Vidu la ĉi-kunan artikoloteton. Temo: 90a dat-reveno de la enlanda milita 1936-2026. Multaj kaj interesaj prelegoj. Gaja etoso.

Joël atestas pri persona grava evento dum ĉi tiu pasinta somero: la romano de Marcelo! Ĉiun posttagmezon dum la kanikula varmego li legis kelkajn paĝojn kaj li transdonas sian entuziasmon pri tre plaĉa legado. Li asertas, ke li ne kutimas legi romanon sed tio tre plaĉis al li kaj eble instigos lin legi pli da romanoj. Ŝerce iuj diras: «la duan de Marcelo!». Ĉi lasta memorigas ke li bezonis tri jarojn (se ne sesdek-du!) por verki la unuan...
Venas propono por literatura kafumado laŭ la temo *La valizeto 518*, ĉiu leginto komentos, kaj diskuto stariĝos kun la aŭtoro. **Marcelo** raportas pri la someraj prezentoj de *La valizeto* dum la SAT- kaj UEA kongresoj, kun tre favora akcepto de la publikoj. La unua eldono elĉerpiĝis. La presisto jam sendis 100 novajn ekzemplerojn, kun marĝenoj iom pli larĝaj kaj sen la finaj aldonaĵoj.

Seán entuziasme rakontas pri sukcesa 111a UK en Graco (01-08/08).
Internaciskale gravas ke ĉijare Aŭstrio iĝis la tria lando, post Pollando en 2014 kaj Kroatio en 2019, kiu oficiale agnoskis Esperanton kiel nacian kulturan heredaĵon. Apudaj landoj, centre de Eŭropo, nun pripensas same agnoski.
Seán unuafoje partoprenis UKon kiel estrarano kun multaj novaj devoj por partopreni en kunvenoj, intervjuoj gazetaj kaj televidaj, prelegoj... kun tre malmulta restanta libera tempo. Li parolas pri la komunista urbestrino kaj la vicurbestrino tre entuziasma, kiu ĉeestis dum la tuta kongreso portante E-ĉemizon. Graco (Graz) estas urbo tre favora al Esperanto kun pluraj ZEOj: E-placo kun E-monumento, E-arbo en publika parko, E-tramhaltejo, kun afiŝoj kaj surekranaj anoncoj pri la E-evento. Krome publikiĝis gazeta raporto sur du plenaj paĝoj, kaj televida informo kun intervjuo de **Seán**.
Kaj ni memoras pri la aŭstria eksprezidanto Franz Jonas, kiu diskutis en Esperanto kun Tito, la tiama jugoslava gvidanto.
Klodin' kaj Marcelo aldonas siajn proprajn impresojn kaj spertojn pri tiu kongreso, kiun ili priskribas kiel luksa.
Klodin' interesiĝis pri la prelego: **Kiu estas esperantisto?** aŭ esperantofono? Ŝi asertas, ke delonge ŝi demandas sin pri tiu grava temo. Ĉu jes? Ĉu ne? Absolute! Tamen konklude ŝi kvazaŭ seniluziiĝis, ĉar fine ŝi demandas sin:
«Kiu mi estas? Mi daŭre ne scias.»
Klodin' lernis multe pli dum la prezento de **tradicia ĉina te-ceremonio** [1]**.** Sciu, ke en Ĉinio ekzistas tutjara kurso en Universitato pri tiu temo. Tiam ĉeestis junaj geakompanantoj riverencemaj, daŭre pretaj helpi la profesoron, jen por porti akvon, jen por formeti taseton... Observinte, **Klodin'** miris pro tiuj rilatoj inter studentoj kaj profesoroj kompare al ĉe ni.
La unua parto de la prezento konsistis en klarigoj pri tekultivado kaj teoria parto, dum la dua parto temis pri preparado mem (kvazaŭ meso)... kun fina gustumad(et)o.

———————————————————————————————————

[1] Vidu p.28

Marcelo ĝuis la milhoman «formikejon» kaj la prezentojn de la muzikalo *Sorĉe de verda stelo,* - kies filmon li promesas iam montri dum kunveno de Esperanto-Gironde -, kaj tiun de sia libro.

En Graco ĵus antaŭ la UK **Seán** aktive partoprenis en kvardek-homa **unua virina kongreso** - Tie je la 8h30 li prelegis pri la vivo de irlandaj virinoj antaŭ plenplena salono. Mirige je tiu frua horo!

Meze de septembro **Seán** partoprenis ankaŭ en la sukcesa **lingvofestivalo en Slovakio**: 600 partoprenantoj inter kiuj 300 instruistoj. Tie li prelegis... en la angla!

Hervé en Greziljono vizitis renkontiĝon unue kun **GLAT** (*Gejaj Lesbaj Ambaŭseksemaj Transgenruloj / Transseksuloj)* - sed bedaŭrinde ĉeestis tiam nur 5 partoprenintoj -, kaj sekve kun **INOE** naturista asocio kun 30 partoprenintoj. La prelegoj estis en Eo kaj en la Franca. Matene okazis kursoj por komencantoj (4 partoprenintoj) kaj progresantoj (deko da) dum la aliaj turismis.

Kaj pri niaj ĉi-jaraj projektoj

Elvezio petas novaĵojn pri la **novelokonkursantoj**: **Luca** sendis sian verkon en septembro kaj ricevis afablan respondon, dum **Katja** sendis sian en julio kaj ne ricevinte respondon, ŝi duan fojon sendis la novelon. Tamen daŭre ne ricevis respondon. Post kontrolo de la retadreso ambaŭ konvinkiĝis ke Katja sendis al la taŭga adreso...

Elvezio respondis al la propono partopreni **en lingvistika kongreso** en Parizo en junio 2027. Li pretas prelegi pri la unua traduko de la Dia Komedio de Dante far Giovanni Peterlongo.

Yannick informas pri baldaŭa eksterordinara Ĝenerala Kunsido de Kvinpetalo por modifi statuton, tiel ke donacintoj ricevu impostan rabaton.
Li informas ankaŭ ke li enkasigis la repagon de UEA responde al la sumo pruntita al Amira, la korea kantistino kontraŭ ŝia partopreno en la spektaklo.

Janine petas pardonon, klarigante ke post okuloperacio ŝi restas en atendo de okulvitroj kaj dum tiu tempo tro malfacile povas legi kaj tajpi. Tial malfruos la venonta LEGI... ĝis fino de oktobro...

Klodin' reparolas pri propono de **Ivan Garcia** el Hispanio **pri bitarkivo**.
En lia mesaĝo de la 14a de aŭgusto li skribis:
«Dankon pro la sendo de la bulteno LEGI kaj pro via bonega laboro por la eldonado de la revuo.

Mi estas helpanta pri la arkivado de la bultenoj (kiuj ankaŭ estas videblaj ĉe Bitarkivo: https://bitarkivo.org/gazetoj/legi_la_esperanto_gironde_informilo/ kaj en via retejo https://esperanto-gironde.fr/legi/). Rimarkinte la ciferecan kolekton, mi konstatis, ke mankas kelkaj numeroj, specife:

- La numeroj **130** kaj **137**.

La numeroj **antaŭaj al la 125** (t.e. < 125).

Ĉu eblus scii, ĉu vi disponas pri ĉi tiuj numeroj en cifereca formato (PDF)?
Se vi nur havas ilin en **papera formato**, mi volonte proponas min por ciferecigado:

1. **Sendo per poŝto:** Se eblas kaj ne estas tro da ĝeno, vi povus sendi la fizikajn numerojn al mi al **Valencio (Hispanio)**. Mi skanos ilin kun plezuro kaj resendos ilin al vi (mi kompreneble kovros ĉiujn sendokostojn).

Persona vizito: Krome, mi tre ŝatus **vorti/veturi al via grupo/asocio en Gironde** por skani surloke ĉiujn lokajn gazetojn kaj paperajn arkivojn, kiujn vi eble havas tie kaj kiuj ankoraŭ ne estas ciferecigitaj.

Bonvolu diri al mi, kion vi pensas pri tio kaj ĉu tia vizito taŭgus al vi.»

Marcelo taksas grava tiun memorlaboron kaj tial ni nepre rekontaktu Ivan por konservi la rilatojn kaj proponi iaman viziton.
Tamen antaŭe ni nepre devas retrovi la arkivojn, kiuj post la fermo de nia sidejo en Cenon-Palmer, forvojaĝis... ĉe ge-Sarlandie aŭ ĉe Dominiko. Eble iuj el niaj membroj plu posedas tiujn paperajn malnovaĵojn? Ĉu Joël? Li esploros...

***

La komuna tagmanĝo ĉiam abundegas. Kaj pro la varmo plu somera la supo de Rose ne mankis. Tamen Rose kaj Bernardo ja mankis!
Posttagmeze **Marcelo** unue rapide prezentis la **festivalon «Foutez nous la paix»** okazonta en oktobro en St-Junien (87 - apud Limoĝo). Sekve li skizis sur mapo sian vojaĝon al Koreio. La grupo bonhumore submetiĝis al du **demandoludoj**, kiujn li preparis kiel animadon por E-staĝo en Seulo. La opinisondado «Ĉu konsentite?...» bone ridigis nin.



Fine **Marcelo** senvualigis historion de la fama kanzono "**Paraŝutisto**" de Le Forestier (ĉu Katrina? ĉu Maksimo?) kun la tre bona traduko de Georges Lagrange registrita de Ĵak Lepŭil.

Raportis Marcelo

RAPORTETO PRI LA FORUMO DE LA ASOCIOJ (2026)

Denove ĉi-jare nia asocio prezentis sin okaze de la Forumo de la Asocioj, okazinta en Pesako la 5an de septembro 2026.

Ni ricevis sufice bonan lokon, apud unu el la du enirejoj, kaj ĝuste sub la protekto de Eŭterpo, la diino de la muziko…. Kaj fakte ni multe bezonis ŝian helpon… kaj ŝi efektive plenigis niaj preĝojn…(vidu sube)



Pluraj el niaj membroj partoprenis kaj deĵoris, kaj mi volas tutkore danki ilin: JeanSeb, Seán, Oliviero, Eriko, Marcelo kaj Luca.

Estis varma tago, multaj homoj vizitis la forumon kaj ankaŭ nian budon, bele kaj abunde ornamitan per bandeloroj, flagoj, libroj, broŝuroj, ktp. La flamo de nia asocio ŝvebis al la venteto, allogante la publikon.

Matene, ni ricevi la viziton de Claude, kromnomita la «magiisto» , tiama lernanto de Joël. Li aĉetis unu ekzempleron de nia brasensa libro, kaj dum nia kantado sursceneje, li fotis kaj faris kelkajn videojn, kaj Eriko miksis la tuton en tre bela filmeto, spektebla en nia retejo. Dankegon al ili!

Ankaŭ venis al nia budo kortuŝa vizitanto, nome la bofilo de nia tiama kasistino Ŝeline Demontoux. Li ne plu parolas en E-o, tamen li rakontis pri la longa kaj dumviva engaĝiĝo de liaj bopatroj per kaj por Esperanto.

Proksime al nia budo mi rimarkis, ke deĵoris du asocioj pri la okcitana, do mi iris paroli kun ili por reklami la koncerton de Jomo la 13an de decembro okaze de la Zaza-festo. Dum la asocio de la Calandreta, la okcitana lernejo, tre favore akceptis min kaj notis la daton de la koncerto, la alia asocio, La Estaca, rezervis al mi malpli favoran akcepton. La sinjoro kiu deĵoris (verdire: li frandis sian sandviĉon kaj ĝuis la spektaklon sur la scenejo, do sendube mi ĝenis lin...) respondis ke li ne scias ĉu tiu vere povas interesi lian asocion, ĉar li opiniis, ke ne estas tute evidenta afero konsenti meti sur la saman nivelon la malnovan, riĉan, prestiĝan lingvon de la trobadoroj kun juna, artefarita kaj preskaŭ senhistoria lingvo. Mi devas konfesi, ke ne ekzakte tiel parolis li al mi, tamen tiel mi interpretas lian iom ĝenatan sintenon, dubojn, hezitojn. Strange, ĉu ne? Eble li timas la konkurencon de alia lingvo, kaj volas ĝisoste protekti sian lingvon. Tamen, li donis al mi la borŝureton kun la retadeso de la aoscio por ke mi sendu al ili la programon de la koncerto. Do mi faros, al ambaŭ asocioj kompreneble.

Kiel kutime, venis pluraj scivolemuloj, kelkaj lasis siajn retadesojn: ni vidos ĉu vere ili pretas lerni la lingvon en nia asocio.



Kiel lastjare, ni prezentis nin sur la scenejo kaj kantigis la publikon per du kantoj: la Eŭropa himno de Umberto Broccatelli kaj ĉi-jare ankaŭ la unuaj strofoj de *Tuj la kompanar'* de Brassens. Ni disdonis la parolojn inter la publiko por ke ili kunkantu. Domaĝe, ke estis prekaŭ la fino de la forumo, do malpli da homoj ĉeestis.

Post kelkaj vortoj de la prezidanto pri nia asocio kaj ĝia longa kaj prestiĝa historio en Bordozo, la vic-prezidanto parolis pli ĝenerale pri la situacio de Esperanto mondskale, ĉefe pri la lastaj atingoj en Grazo (nome la tria agnosko de Esperanto kiel nemateriala heredaĵo de la homaro).

Finfine, ek al la muziko! Ĉi-jare ni bonŝancis, ĉar ni ne plu kantis «a cappella» sed nin akompanis la gitaro kaj la mirlitono de Sro Godot, la kromnomo de Luka, ĉar ĝis la fino ni ne tutcertis, ĉu li venos aŭ ne...tamen finfine niaj preĝoj al la diino de la muziko estis plenigitaj (kaj oni eltrovis feliĉan solvon al la teatraĵo de Samuel Beckett...).

Ni bele kantis, kvankam nur unisone, kaj la ĥorestro de nia koruso diris al mi ke tio estas domaĝe, kaj ke li ŝatus verki la harmoniojn…Do ni vidos venontjare, tamen ni nepre bezonos ankaŭ virinajn voĉojn! Ni staris kun niaj verdaj ĉapeloj, tamen tri el ni devis surmeti malsamajn ĉapojn, do mi demandas al sinjoro kasisto, ĉu ni rajtas aĉeti kelkajn pliajn ĉapelojn por eviti ke iu ano de nia asocio svenu pro la pli kaj pli fortaj varmegoj kiuj atendas nin…

Elvezio



La budo de Seán en Parentis

Luka, piede de lia muzo



Tri membroj de ESPERANTO-GIRONDE aktivis en la 111a Universala Kongreso inter la 1a kaj la 8a de aŭgusto 2026

Seán, Klodin' kaj Marcelo partoprenis en Graco (Graz - Aŭstrio) la ĉi-jara UK inter la 1138 kongresanoj venintaj el 62 landoj. La impona belega barokstila kongresejo de la urbo larĝe malfermis ĉiujn siajn pordojn por honore akcepti nin. Grandega lukso! Neniam mi konjektis, ke iam esperantistoj kongresus en tiaj luksaj kondiĉoj! Mirindaj memoraĵoj!



La salono Zamenhof, ĉefa kunveno kaj koncertejo

Dum la tuta semajno la organizado estis tute glata kaj sincere gratulindas kaj dankindas la kongresa fako kaj LKK. La programo estis tre densa kaj la kongresejo vere similis formikejon. La esperantistaro daŭre ĉiam, ĉie, en ĉiuj koridoroj, salonoj, rapidis, prelegis, sidis, babilis, muzikis, kantis kaj dancis, provis ripozi, pretiĝis por ekskurso...



En tiu amaso, kiel renkonti celatojn sen rendevuo? Tamen ja okazis! Kaj kompreneble ankaŭ

tute hazardaj interŝangoj de kelkaj vortoj kun nekonatoj el diversaj landoj.

Sed nia loka triopo tien iris por aktivi: jen Seán, kiel unua Vic-Prezidanto de UEA kun rolo adekvata: zorgi pri la oficialaj eksteraj rilatoj aŭ prezidanta kunvenon pri internacia komunikado. Seán intervjuita parolis ĉe aŭstra televid-kanalo, vizitis kun la vic-urbestrino la ĉinan ekspozicion de la kongreso. Kompreneble li digne oficis dum la oficialaj malfermaj kaj fermaj ceremoniojn, kaj ankaŭ partoprenis la malfermitan Komitat-kunsidon.



La nuna estraro de UEA: Seán, So Jinsu (dua vic-prezidanto), kaj Fernando Maja (prezidanto)





Radianta Seán, dum la malfermo kun Zdravka Bojčeva, kiel dum paŭza tempo kun Klodin'



Kaptita ekrano el la telvidelsendo





Dum la kunveno de la Komitato de UEA



La Espero, konkluda himno

Kaj spite al tiuj multaj taskoj, Seán trovis tempon veni por subteni la prezenton de *La valizeto 518,* laŭdante la verkon kaj instigante la ĉeestantojn akiri la romanon!
Nome de ĉiuj: DANKEGON Seán!

Klodin' kiel kutime diros al vi, ke ŝi nenion faris kiel aktivulino... sed kiel kutime eble ne sub la lumoj, sed en la ombro, ŝi estis tre efika! Ekzemple jam dum la unua vespero por la Movada Foiro, kie ŝi transprenis la rolon kolekti la bultenojn de la partoprenintoj en la lotumado por gajni tri librojn *La valizeto 518* kaj 12 broŝurojn *Sorĉe de verda stelo*. La gajnintoj legis siajn nomojn en la dua *Grazeto*, la kongresa kuriero. Ja la tablo de la Artista Efemera Rondo estis tre aktiva!





Dum la Movada Foiro



Merkredon okazis oficiala plantado de E-arbo en urba parko. Reale la ĝardenistoj jam vintre plantis ĝin, tamen ĉiuj ĉeestantaj kongresanoj ŝovelis iom da tero piede de tiu platano. Kaj Klodin' tenas ĝian oficialan plakon por la foto.



La prizorgoj de Marcelo komence de la semajno estis kunigi la artistojn por provludoj de la spektaklo prezentota la ĵaŭdon vespere, *Sorĉe de verda stelo*. La defio estis ja granda sed ĉiutage matene ni sukcesis progresigi la aferon kaj finfine ĵaŭdon matene ni sukcesis starigi la ununuran sinsekvon de ĉiuj scenoj (kvazaŭ) sentinterrompe... Post la tagmezo venis lastminutaj aranĝaj finpretigoj... Sed la rezulto estis mirinda! Kaj por ni ĉiuj artistoj sur la scenejo, kaj por la publiko, kiu surprizita, tute ne atendis ion tian, "nekredeblan muzikalon" diris Zdravka, respondeculino pri kulturo en la Komitato. La publiko varme aplaŭdis, tiel atestante, ke ni atingis nian celon. Mi konfesas, ke mi ne tro sciis, kiel reagus UEA-publiko al politike engaĝigitaj kantoj, sed la koreinoj tiel vigle skandis kaj martelis la aeron per siaj levitaj pugnoj, ke ili konvinkis. La muzika kaj kanta profesieco de Kajto kaj Amira alten tiris la



nivelon de la prezento. Aldone la belegaj pentraĵoj de Kyina (korea ĉeestanta esperantistino) ilustris la rakonton kaj alportis ceteran arton en la tuton. Kvankam amatoroj, Haesim, kiu unuafoje teatrumis antaŭ publiko, kaj mi kredinde roligis niajn personaĵojn, flue legante la rakonton.

Fine ĉiuj kunĝuis kaj pro troa ekscitiĝo mi ne kapablis dormi dum la tuta sekva nokto!




Amira Chun, Nanne Kalma, Ankie v. der Meer. *La korea koruso*



La bisa kanto, lasta refreno verkita je la 5a horo en la sama mateno.

La morgaŭon, vendredon, okaze de la duon-horo de la aŭtoro, mi prezentis la ĵus eldonitan "La valizeto 518". Rapide pasis la tempo, kaj la plenplena salono (70 sidantoj plus kelkaj starantoj) ŝajnis interesata.

La sorĉo de la antaŭvespero plu tenis la ligon inter ni. Fine la lastaj libroj de la stoko vendiĝis kaj pluraj postulis dediĉan subskribon.



La valizeto 518 trovis portempan lokon sur tablo de la libroservo

El la revuo ESPERANTO de UEA n-ro 1415 (9) Septembro 2026

Inter la multnombraj programeroj de la 111-a UK en Graco la plej nekutima estis la interkultura kaj kanta spektaklo kiu okazis ĵaŭdon vespere. Dum unu jaro esperantistoj de Francio, Nederlando kaj Korea Respubliko kunlaboris por prezenti al la kongresantoj belan spektaklon, plenan de poezio, melodio, kantoj kun belaj pentraĵoj sur ekrano en la fono.
Joël Fontaine



111a UK en Graco (Graz) Aŭstrio - 01-08/08/2026

La saluto de SAT al UEA



Dum la malferma kunveno, kamaradino Haesim Park el Seulo kaj Marcelo kunlegis la salutvortojn senditajn de Vinko Markov, la prezidanto de SAT:

"Karaj gekongresanoj,
Ni salutas vin nome de Sennacieca Asocio Tutmonda, SAT. SAT estas renkontiĝejo por homoj, kiuj pretas tolereme interŝanĝi pri la diversaj eblaj vojoj por konstrui solidarecan mondon, sen subpremo kaj sen homekspluatado. En SAT renkontiĝas ne ekologiistoj kun pacistoj, ne liberecanoj kun komunistoj, sed gekamaradoj kun gekamaradoj. SAT kongresis kvar fojojn en Aŭstrio, inter 1925 kaj 1990, rekte dank' al la agemo interalie de Franz Jonas. Pro tio nur eblas ĝoji pri la lastatempa revigligo de la movado en Aŭstrio, pri kiu atestas la ĉi-jara UK, al kiu ankaŭ kontribuos kelkaj SAT-anoj. Venontjare, SAT havos sian centan kongreson ne tre for de ĉi-tie, en Kragujevac, Serbio, fine de julio.
Se vi deziras pli detale konatiĝi kun SAT, ne hezitu aboni ĝian gazeton Sennaciulo. Tiel vi povos rekte informiĝi pri la vivo de la asocio laŭlonge de la jaro. Aŭ vizitu ĝian denove funkciantan retejon, kie aperas la deklaracio kaj gvidrezolucio de la ĵusa kongreso, okazinta en Leono.

Dankon pro via atento. Havu agrablajn kaj fruktodonajn kongrestagojn!"



Dumkongresaj belaj renkontoj...

Kongresoj estas okazoj por renkontoj, hazardaj aŭ ne! Jen kun konatoj, jen kun tute novaj personoj. Kaj dum la UK en Graco, jen estis por mi tiaj okazoj.

Unue mi parolu pri Aneta, polino iom pli aĝa ol mi, kiun mi ekkonis en 1984 okaze de la SAT-JunnulFaka Renkuntiĝo en Villandraut. Mi ne plu revidis ŝin de 42 jaroj! Sed ŝi frapis mian ŝultron elirante el la malferma kunveno, kie ŝi vidis min sur la podio kun mia nomo sur la ekrano!

Due pri Niko Vološin, ukraina desegnisto, kun kiu mi perletere fine de la 1980aj kaj komence de la 1990aj jaroj. Neniam mi havis okazon renkonti lin, ĉar kam li vizitis nian grupon kaj loĝis ĉe Joël, mi estis en Germanio.

Trie kun Monika Molnar, hungarino loĝanta en Svislando, kiu proponas desegni por plezuro.

Kaj fine, Sabine Trenner, berlinanino, kiu verkis tre amuzajn tekstojn por Kajto kaj nun multe pedagogiemas...

111a UK en Graco (Graz) Aŭstrio - 01-08/08/2026



La solena ferma parolado de Fernando Maja, la prezidanto de UEA

Estimataj, karaj amikoj, ĉu ni estas feliĉaj?... Ĉu vi ĝojas?! Antaŭ unu semajno ni alvenis en Graz plenaj je atendoj – kaj espero. Nun ni prepariĝas por foriri – kaj mi povas diri al vi: kun io same valora. Ĉu vi konscias pri tio, kion ni finfine kunportas el Graz?

Kiam oni demandas min pri tio, kio estas la ĉefa celo de la Universala Kongreso, mi respondas tre simple, ke la ĉefa celo de UK estas la sperto de la kongresanoj, tiel ke ili revenu hejmen *ĝojaj*. Por multaj el vi ne facilas veni al la UK: tio povas postuli altajn elspezojn, foruzon de raraj ferioj – kaj multe da energio kaj korpa kaj mensa. Tial mi ne nur tre multe respektas vin pro tio, ke vi decidis veni, sed mi ankaŭ zorgas, ke vi, veninte al la UK, fariĝu pli ĝojaj.

La inaŭguro de nia Universala Kongreso komenciĝis interalie per espero. Nun ni fermas per ĝojo. Tio estas perfekta cirklo, ĉar espero estas tio, kio movas nin antaŭen, dum ĝojo estas la konkreta kompreno de tio, ke la vojo – nia vojo, karaj – valoras.

La ĝojo havas plurajn radikojn. Ĝi estas tiu viva sento, kiu venas el la koro. Sed ĝi ankaŭ venas el la konscio pri posedo de io bona. La UK ne konsistas nur el sia programo: ĝi temas ankaŭ pri tiu unika momento, en kiu ni komunigas ion tre specialan kaj al kio ni apartenas.

La ĝojo havas siajn radikojn ankaŭ en la kontento pro la rezulto atingita. Vi multon faris, investis por ĉi tien esti; vi multon preparis kaj realigis por al la UK kontribui: vi pro tiu bela rezulto meritas feliĉi! – Sed fine, karaj, plej potenca estas la ĝojo, kiam ĝi havas siajn radikojn ankaŭ *en la sento de dankemo*.

Ja se ni hodiaŭ foriras el Graz ĝojaj, tio estas ĉar plurdekoj, se ne centoj, da homoj laboris dum la lastaj monatoj, dum unu jaro aŭ pli, por ke ĉio

tio okazu. Oficistoj, LKK-anoj, estraranoj, komitatanoj, komisiitoj, prelegantoj, artistoj, libroservistoj, tradukistoj – volontuloj. Malantaŭ tiu sento de ĝojo troviĝas ies laboro. Kaj eĉ pli: kunlaboro. Harmonia kunlaboro. Ni estu do, karaj, al ĉiuj dankemaj – reciproke dankemaj – tiel, ke tiu nia ĝojo – *dankoplena* – estu ankaŭ la forta ligo, kiu unuigas nin per reciproka respekto, aprezo kaj amo.

Ĝojo tia, miaj karaj, ĝojo tiel kompleta, estas ankaŭ elmontro de kuraĝo kaj rezisto. En epoko, kiu ĉiutage sugestas al ni timi, ni elektis pasigi unu tre specialan semajnon kune, konstruante amikecon vivantan el ĝojo kaj espero. Tio estas forto – kaj refortiĝo. Ja la ĝojo, kiun ni ĉi tie travivas, ne estas fuĝo el tiu vasta mondo, ĝi estas valora ilo por reeniri ĝin.

Miaj karaj: se vi revenas hejmen iom pli esperemaj, iom pli ĝojaj, iom pli kuraĝaj – tiam la Universala Kongreso sukcesis. Kaj se estonte oni demandos al vi, kial vi vojaĝas al Universalaj Kongresoj, vi povos respondi: "ĉar dum unu semajno mi rememoras, kia povas esti la mondo". Kunportu do hejmen tiujn rememorojn – kaj tiun ĝojon. Kunportu kaj kundividu ĝin – ĉar ĝojo, same kiel Esperanto, ekzistas por esti kundividata.

Dum la inaŭguro de nia UK ni kundividis la ideon kaj konscion, ke ni estas parto de la solvo. Hodiaŭ mi vidas tion eĉ pli klare, ĉar dum ĉi tiu semajno ni ne nur parolis pri pli bona mondo – ni vivis etan modelon de ĝi.

Miaj tre karaj! Ni ne adiaŭas. Konektitaj ni estas kaj restas. Kaj nia "ĝis revido" estas nur unu plia ago de nia kuraĝa aktivismo vastigi en la mondon dialogon super perforto; la festadon de nia diverseco; kaj la certecon, ke ni estas homoj kun homoj, anoj de tiu sama ideo, kiu obstine persistas serene kaj nedisrompeble: la ideo de espero, movanta nin antaŭen.



La memoro pri niaj ĝojaj tagoj restu viva en ni kaj estu nia forto ĝis nia venonta renkontiĝo, jen kion mi deziras – mi dankas vin, miaj karaj amikoj, samideanoj: kun vi mi estas ĝoja. Koran, koran dankon!

Raportis Marcelo

Kanzono - enkonduko de la spektaklo "Sorĉe de verda stelo"
Kiam filozofa penso kaj PIVa difino inspiras versojn



La sep maroj

(Marcelo / Nanne)

Refreno: La sep maroj, la sep maroj,
La sep maroj, ne disigas.
Oceanoj, Oceanoj,
Oceanoj ja alligas.

Universe bluas tero - eta planedo, mar-sfero,
kie drivas ses kontinentoj, tie kunloĝas multaj gentoj.

Vasta estas nia mondo, kovras grandparte ĝin ondo.
Akvo nepra en oriento, kiel por viv' en okcidento.

Refreno

Kromnomitaj 'la sep maroj', tri oceanoj de jaroj
etendiĝas inter la grundoj. Glatas surfaco, ne profundoj.

Kvankam foje ĝi koleras, ŝaŭmas, ŝveliĝas, danĝeras,
maro bonas kiel la bontrovo prava de la brita filozofo.

Refreno

***

Dum la preparado de la spektaklo Amira, kiu kunkantos la kanzonon, kaj Kajto, demandis pri la diferenco inter oceano kaj maro, kaj fakte kial sep maroj? Kiuj estas tiuj sep maroj?

Respondas PIV kaj CHAT-GPT

PIV:

oceano

1 interkontinenta salakva maregо:
post longa naĝado en ŝtorma ~o, jen li trafis florplenan insulon[CPi];
oficiale ekzistas nun kvin ~oj: la Arkta (O) ~o, Atlantiko, Pacifiko, la Hinda (O) ~o kaj la Suda (O) ~o. ➞ maro, oceanografio.
2 la tuto de ĉiuj ~oj **1** rigardataj kiel unu: *estas neeble, ke ili estu transirintaj trans la ~on, kiu ĉirkaŭas la tutan teron!*[FK]

★maro

1 vasta etendaĵo da sala akvo, kiu kovras la plej grandan parton de la terglobo, ofte kontraste kun la seka tero aŭ la sensala akvo:
laŭdu la ~on, sed restu sur tero[Z]*; li jam estas trans montoj kaj ~o*[Z]*; (...)*
➞ oceano; ~bordo, ~kolo; navigi.
2 difinita peco de ~o[1], parte aŭ tute ĉirkaŭita de tero:
***la sep ~oj* (la tuto de la oceanoj).**

Chat-GPT:

La esprimo **"la sep maroj"** estas tre malnova kaj troviĝas en pluraj kulturoj kaj lingvoj. Ĝi ne devenas el unu sola lingvo, sed aperas en diversaj civilizacioj tra la historio. La nombro **sep** ofte havis simbolan signifon de tuteco aŭ kompleteco, kio klarigas kial oni uzis ĝin por signifi "ĉiuj maroj de la mondo".

La plej malnovaj originoj

La plej fruaj konataj mencioj troviĝas en la civilizacio de **Mezopotamio** antaŭ pli ol 4.000 jaroj. En sumera kaj akada tradicioj oni parolis pri sep maroj aŭ sep regionoj de akvoj, kiuj ĉirkaŭis la konatan mondon.
Ankaŭ en antikva Hindio la sanskrita esprimo **sapta samudra** ("sep oceanoj" aŭ "sep maroj") aperas en religiaj kaj mitologiaj tekstoj.

En la antikva Mediteraneo

La grekoj kaj romianoj uzis la esprimon en diversaj sencoj. Foje ĝi rilatis al la marĉoj kaj lagunoj ĉe la delto de la rivero Pado en norda Italio. Alifoje ĝi simple signifis la ĉefajn marojn konatajn de la mediteranea mondo.

Por la romianoj, la "sep maroj" ne estis nepre la samaj maroj kiel por aliaj popoloj. La listo variis laŭ la epoko.

Dum la mezepoko

Kun la disvolviĝo de arabaj kaj eŭropaj komercaj vojoj, la signifo ŝanĝiĝis. La "sep maroj" povis signifi la ĉefajn marojn tra kiuj navigis komercistoj inter Eŭropo, Arabio, Hindio kaj Orienta Azio.

Ekzemple, arabaj geografiistoj foje nomis sep sinsekvajn marajn regionojn sur la vojo de la Persa Golfo ĝis Ĉinio.

En la epoko de la grandaj malkovroj

Post la 15-a kaj 16-a jarcentoj, kiam eŭropanoj ekkonis la tutan terglobon, la esprimo iom post iom komencis signifi ĉiujn oceanojn de la mondo.

En la angla lingvo, la frazo **"the Seven Seas"** fariĝis tre populara en la 19-a jarcento, precipe en maristaj rakontoj kaj aventurliteraturo. De tie ĝi disvastiĝis ankaŭ en multaj aliaj lingvoj.

Kial ĝuste sep?

La nombro **sep** estas tre ofta simbolo de pleneco: sep tagoj de la semajno; sep planedoj de la antikva astronomio; sep mirindaĵoj de la mondo; sep ĉieloj en diversaj religioj.

Pro tio "sep maroj" ofte signifis ne precizan geografian nombron, sed **la tutan konatan maran mondon**.

La signifo en PIV

Kiam PIV klarigas: **la sep maroj = la tuto de la oceanoj**, ĝi sekvas la modernan, internacian uzon de la esprimo. Temas ne pri sep precize difinitaj maroj, sed pri poezia aŭ tradicia maniero diri: **ĉiuj maroj kaj oceanoj de la Tero.**

Tial frazo kiel: *Li navigis tra la sep maroj.* signifas: *Li vojaĝis tra la maroj de la tuta mondo.*

Historie la esprimo povas aludi al tre malsamaj maroj laŭ la epoko, sed en moderna Esperanto, same kiel en multaj aliaj lingvoj, ĝi estas ĉefe figuraĵo por la tuta oceana mondo.

Ĉu vi estas vinofilo aŭ teofilo?

Mi ĉeestis inviton al ĉina-teo-ceremonio dum la 111a universala kongreso en Graz.



Interesa prelego, kiun prezentis dum unu horo kaj duono sinjorino Vu Chen, eminenta instruistino de teo-ceremonio en ĉina universitato kun la apuda samtempa tradukado de sinjoro Wang Jingrong.
La enkonduko memorigas la aŭskultantojn, ke krom Ĉinio pli ol 60 landoj produktas teon, kaj la manieroj trinki en ĉiu lando estas tre buntaj.
Ni aŭdis tiam la sekreton de ĉina maniero prepari kaj trinki teon konsiderante ke teo, kiu ekzistas en Ĉinio ekde jarmiloj, unue estis uzata pro siaj kuracaj efikoj kaj estas fundamenta elemento de la ĉina kulturo.



Baza superrigardo pri la ses ĉefaj kategorioj de ĉina teo (verda, blanka, flava, oolong, ruĝa, nigra) celas konduki nin al la kompreniĝo, ke nepre necesas scipovi distingi bonkvalitan teon, elektante ĝin konforme al ĝiaj propraj ecoj kaj la celataj efikoj.
Ekzemple: Printempe, oni povas trinki refreŝigan verdan teon,
Somere, delikatan blankan teon,
Aŭtune, varman nigran teon,
Vintre, densan malhelan teon,
Kiam vi bezonas malstreĉon, provu flavan teon.
Kiam vi sopiras intensan aromon, gustumu Oolong-teon.

Bona teo devas montri la kunfandiĝon de jino kaj jango posedante la misteran povon enblovi en la korpon fluon de energio. Tio signifas, ke post kiam ni trinkis vere bonan teon, eble post unu aŭ du horoj, eĉ pli, ni ankoraŭ klare sentas, ke la forto de tiu teo alportas al la korpo varmeton aŭ al la animo ĝojon.

Jen kelkaj teoj:



Ambaŭ estas nigraj teoj, sed la Keemun-teo de Anhui kaj la nigra teo de Yunnan havas malsamajn stilojn.

Pri nigra teo, oni nepre menciu "Zhenghanxiaozhong" de Fujian kun unika fumeco. Ankaŭ la Jinjunmei de Fujian pro ĝia dolĉa gusto.

Wuyi-roteo estas speco de oolong-teo.



La sekaj folioj estas helverdaj, plataj, glataj, rektaj kaj akrapintaj kun riĉa aromo.

La sekaj folioj, dense kovritaj per blankaj haroj estas blankaj kiel lunlumo.

Malhela teo estas postfermentita teospeco. Ĝia gusto estas silkeca, kun aromoj de ĉinaj daktiloj, de ligno, de ginseng, ktp...

Ĉu vi scias, kiuj sekretoj kaŝiĝas en la ĉina signo 'idografiaĵo) "teo"?



La supra parto estas "herbo"	Meza parto estas "homo"	Malsupra parto estas "arbo"

Kune ili signifas "homo inter herbo kaj arbo" - ĉinoj kunfandas "teon, homon kaj naturon" en unu tuton. Trinki teon estas dialogo kun herboj, arboj, ĉielo kaj tero.

Post la teoria parto, ni rigardis kiel oni preparas teon laŭ la ĉina tradicio, kaj ni estis invitataj al gustumado de diversaj infuzaĵoj.
Tiu tradicia ĉina metodo por prepari teon karakteriziĝas per sia precizeco, sia rito kaj sia atento al detaloj. La elementoj de te-servico, taso, te-kruĉo, estas tre malgrandaj kaj memorigas min pri pupa ludo-vazaro.







Ĉio estas ligita al simboloj. La kovrilo simbolas la ĉielon. La subtaso reprezentas la teron. La bovlo enkarnigas la homon, lokitan en la ĝusta mezo inter la ĉielo kaj la tero.



Tuj post la lavado de la servic-elementoj per bolanta akvo, por ke ili ĉiuj havu la saman temperaturon, oni metas la tefoliojn en la teujon kun akvo

je taŭga temperaturo. Ĉinoj uzas tutajn tefoliojn por montri la veran guston kaj esencon de la teo.
Sed ĉi tiu unua infuzaĵo ne estas trinkata, ĝi servas por veki la tefoliojn. La teo poste estos infuzata plurfoje en la sama teujo, kaj ĉiu infuzado mallonge daŭras.
Iuj teoj povas esti infuzataj ĝis ses fojojn, aliaj pli. Tio dependas de iliaj unikaj ecoj. Teo ludas esencan socian rolon en Ĉinio, la preparado de teo estas ago de respekto kaj atento al la vizitantoj.

Jen enspira spektaklo, kiu celas enkorpigi la orientan teo-ceremonian spiriton kaj transdoni la filozofian koncepton:
"La limoj de landoj povas esti finitaj, sed plezuro kunhavi teon estas senlima".

Mi humile konfesas, ke mi ne ĉion memoras kaj estas malproksima de tio, ke mi enkorpigis la orientan teo-ceremonian spiriton. Mi tamen komprenis, ke neglekte trempi saketon en varman akvon babilante kun sia najbaro tute ne respektas la riton de la tradicia ĉina pretiĝo, veran ceremonion, kiu postulas agi senhaste kaj serene. Ankaŭ la gustumado de teo estas arto.

Aŭskultante sinjorinon Vu Chen, mi faris tre personan paralelon (kaj tute sendependan de ŝia volo): estas ekzakte kiel ĉe la vino. En ambaŭ kazoj, ekzistas la amatoro, kiu portas la glason al la buŝo sen rigardi nek flari, kaj la spertulo, kiu mobilizas siajn sensojn — la vidon, la flaron, la guston. Aŭ por la tanino, aŭ por la teino, iuj trinkas... kaj iuj gustumas! Mallonge, se vin-spertulo estas 'vinofilo' (kiel oni diras bibliofilo laŭ PIV por amatoro de luksaj aŭ raraj libroj), te-spertulo estu 'teofilo' (kiel skribus Cart). Do kiam vi renkontos Teofilon, ne servu al li iun ajn teon. Ja neniam venus al via menso la ideo servi grandan vinklasikaĵon de Bordozo en plasta pokalo kun glacikubo. Nu, por la teo, estas tute same: havu saman respekton, formetu tiun fadenhavan saketon antaŭ ol Teofilo ĵetos al vi sorĉon.

Klodin'

LEON'! HA LEON'! 19a de Julio 2026

Unuan fojon mi partoprenis en SAT-Kongreso. SATana amiko el Bordozo (Francio) informis min, ke la dato de tiu kongreso samtempas kiel la komenco de la hispana enlanda milito, memorigante tiun gravan eventon.
Do, mi konsentis iri al Leon' kun mia amiko, ĉar tiu evento estas ege grava por mi: miaj gepatroj partoprenis en tiu milito.
Samtempe, mi malkovris Leon kaj la SATanojn!! Dank' al la organizantoj, la loko komforta, la manĝoj bonaj kaj diversaj, la salono en kiu okazis la prelegoj, kaj la ĝardeno... lasas al mi tre bonajn kaj emociajn memoraĵojn. Mi ne forgesas la belan urbon Leon', kiun mi malkovris promenante.
Mi precizigas ankaŭ ke mi povis babili kun afablaj SATanoj venantaj de diversaj landoj.
Ĉu ne estas la celo de Esperanto, kompreni la aliajn, parolante komunan lingvon?

Gloria



Vacapa mesaĝo de ~ **Jeanseb**
[25/06/2026 14:56:56]



Esperanto kaj kulturo

Respondante al demando en Lernu, mi skribis tion pri esperanta kulturo. Ĉu tio estas uzebla aliloke? Bonvolu komenti kaj eventuale kritiki.

Laŭ lingva vidpunkto, kulturo estas la mensaj reprezentaĵoj (bildoj kaj konceptoj), kiuj estas malantaŭ vortoj. Estas kiel la kaŝita parto de glacimonto.

Dialogantoj uzas la (supozite) konatan kulturon por komprenigi al la aŭskultanto tion, kion oni volas komuniki. Ekzemple, fakulo kiu volas paroli pri sia fako al nefakuloj, uzos "ĝeneralan" kulturon por komparoj, metaforoj aŭ klarigoj.

La demando estas: Kio ludas tian rolon en Esperanto?

La komuna kulturo estas - laŭdifine - minimuma: tial kombinaĵoj de vortoj preferindas al multaj vortoj. La lingvo estas konstruita tiel. Tamen, komuna kulturo ekzistas en globaligita mondo: ĉiuj scias kio estas poŝtelefono, kaj kion ĝi povas fari. Tiun kulturon Esperanto povas uzi.

Estas tria fonto: tipe esperantista kulturo. Esperanta vivo, kongresoj, originala literaturo, famaj esperantistoj, interna ideo, lingvaj harfendaĵoj, Pasporta Servo, esperantista folkloro. Tiu kulturo aperadis dum la centkvardekjara historio de la lingvo.

Krome, esperantistoj ĝenerale estas pli kulturhavaj ol ĝenerala publiko, kvankam ne je plejelita nivelo. En mia klubo[1], ekzemple, okaze de ĉiumonata renkontiĝo estas prelego pri kultura temo: historio, botaniko, kantoj, literaturo, ktp.

Esperanta kulturo estas riĉa. "Sufiĉas" serĉi en Interreto.

NB: mi skribis "sufiĉas" inter citiloj, ĉar pri komputilaĵoj, ofte estas lavango da necesaj kondiĉoj... 😉

---

[1] Esperanto-Gironde, kompreneble!

Renato

Renato Damarin forpasis en julio, kelkajn tagojn antaŭ sia centjariĝo.
Tre bona esperantisto, li multe agadis kadre de nia loka asocio «Groupe Girondin des Travailleurs Esperantistes» kiu, en 1986, fariĝis Esperanto- Gironde.
Mi konatiĝis kun Renato en la jaro 1975 kiam mi eklernis Esperanton. En tiu epoko, li rolis kiel kasisto de la asocio kaj respondeculo de la libro-servo. Kelkajn jarojn poste, li lasis la taskon al Emile kaj Micheline Demontoux. Tiam, li dediĉis sian tutan tempon al zorgado pri sia bieno, en Leognan, nomita «Paradizo Tuj». Tiu-ĉi konsistis en granda tereno sur kiu li mem, helpe de amikoj, konstruis domon.
Li revis estigi komunumon por labori surloke kaj produkti legomojn, fruktojn kaj cerealojn; ĉefajn punktojn de sia nutraĵo ĉar li estis vegetarano. Li plugis la grundon helpe de ĉevalino kaj li kultivis laŭ la ekologia maniero ĉar li ŝatis sanan nutraĵon; kaj li kapablis prepari bongustan manĝaĵon.
Sed la ĉefa celo estis vivi kiel eble plej aŭtonomece; maksimume fari per si mem.
Li ne ŝatis la konsumsocion. Liaj ekologiaj kaj liberecanaj konvinkoj estis rigoraj, eĉ drastaj; eble pro tio, lia projekto neniam vere sukcesis.
Tamen lia forta personeco estis alloga ĉar li multe sciis, agrable rakontis, ofte ŝercis kaj ridis. Ĉar li ne plu partoprenis en niaj E-agadoj – krom la fakto ke li aperis iun posttagmezon en Artigues okaze de nia SAT-Amikara kongreso en 2007 – kelkaj ĝirondiaj esperantistoj vizitis lin de tempo al tempo. Por mi ĉiam temis pri tre agrabla momento.

Joël



Renato Damarin

La unuan fojon, kiam mi renkontis Renato-n ne estis en la esperanta movado, al kiu mi ne ankoraŭ apartenis. Kun kelkaj kamaradoj, ni konstituis grupeton de l'Union Pacifiste en kiu Renato partoprenis. Kun maljuna hispana amiko ni decidis renkonti Renato-n en lia hejmo, kiun li nomis «Paradizo tuj», en kiu li invitis nin.

La akcepto estis afabla, Renato ĝojis ricevi nin kaj li preparis vegetaran vespermanĝon kiu, laŭ li, ebligus plej klarajn ideojn por diskuti poste!

La manĝo konsistis el dika supo preparita el la ĝardenaj legomoj, salato el amara cikorio spicita per oliva oleo kaj garnita de pecoj da juglandoj, kaj ĉokoladkuko. La pano estis fabrikado de Renato kaj kuirita en la kuirforno pere de ligno. Ĝi parfumis la kampecan salonon, en kiu Renato akceptis nin.

La vespero lasis al mi ne forgeseblajn memorojn pro la originaleco, la kulturo, la vivmaniero, konforme al la absolutaj aŭtodidaktaj ideoj de Renato. Li parolis pri anarkiismo, pacismo kaj pri Esperanto kunligante la unuajn kun la aliaj.

Ekologio estis tre grava temo por li. Renato kulturis sian grandan terenon helpita de ĉevalino kaj en kompanio de kaprino, kiu sekvis lin kiel hundo!



Li almiksis al sia grundo nur naturan rubosterkon. Do, li petis de siaj vizitantoj ne vegetaranoj, iri al necesejo instalita nur por ili, sur pli malproksima loko de sia tereno ĉar li timis, ke iliaj viand-fekaĵoj, malpurigitaj per nevideblaj antibiotikoj, penetros liajn kultivaĵojn!

Mia dua vizito al Renato estas ankaŭ neforgesebla. Tiam, mi partoprenis en la Esperanta Grupo el Ĝirondio kun Leo Robert; la ideoj de Leo tre similis al tiuj de Renato.

Tiun tagon, kiam Leo kaj mi vizitis lin, ni renkontis junan germanan militrifuzanton, kiu trairis Eŭropon kaj decidis resti kelkajn tagojn ĉe Renato. La junulo kaj mi preskaŭ silentis por pli bone aŭskulti la konversacion inter Leo kaj Renato, kiu okazis pri diversaj temoj: politiko, ekologio, edukado, anarkio, Esperanto... Fine de la posttagmezo ni promenis tra la apuda kamparo, aŭskultante Renato-n prelegi pri plantoj, bestoj, arboj...

Mi revenis viziti Renato-n sen Leo, bedaŭrinde, sed kun aliaj esperantistaj kompanoj: Joël, Bruno, Jean Luc. Ĉiam Renato akceptis nin kun plezuro kaj havis novajn anekdotojn por rakonti.

Renato estis viro, kiu lasis neniun indiferenta pro sia originaleco, sia kulturo, kaj sia fideleco al la anarkiisma idealo.

Gloria

ESTRARO
de
«ESPÉRANTO-GIRONDE»

* * * * * * *

Adreso ĉe la prezidanto

* * * * * * * * *

Prezidanto: **Elvezio CANONICA**
Université de Bordeaux Montaigne
UFR Langues,
Domaine Universitaire, Esplanade des Antilles,
33600 Pessac
Tel: 06 72 17 22 97 / canonica.elvezio@orange.fr

Vic-Prezidanto: **Seán Ó RIAIN**
98 route du Mouquet
40160 Parentis-en-Born

Sekretariino: **Janine DUMOULIN**
2, chemin des Nauves
Chardes 17130 MONTENDRE
Tel: 05 46 49 07 46 / janinedum@neuf.fr

Kasisto: **Yannick DUMOULIN**
2, chemin des Nauves
Chardes 17130 MONTENDRE
Tel: 06 84 11 26 95 / yannickdum@aol.com

* * * * * * *

Kontribuojn por LEGI bv. sendi al janinedum@neuf.fr
aŭ al esperanto.gironde@free.fr

https://esperanto-gironde.fr/informletero/

La venonta kunveno okazos je la 10a30 la 29an de novembre en Pessac Bourg.